



LA MARŜADO DE LA KURDA REVOLUCIO.

Kiam Turkio kaj kelkaj ĝihadismaj milicoj ekatakis la aŭtonoman kantonon de Afrino⁽¹⁾ mankis malmultaj tagoj por la komenco de la II-a Internacia Marŝado por la Kurda Revolucio. Tiu ĉi mobilizado precipe devis postuli la liberigon de Abdulah Ocalan kaj la ceteraj kurdaj politikaj prizonuloj kaj la oficialan agnoskon de Kurdio. Sed, kaŭze de la kruela milita invado fare de la dua plej granda armeo, kiu membras en NATO, ĉijare oni ŝanĝis la celojn kaj la itineron: “La agreso ne estas kunpuŝiĝo inter du militaj fortoj, sed konflikto inter du manieroj alrigardi la mondon”, klarigis Necide Qeredaxi, membro de la KPK⁽²⁾.

“De unu flanko, Turkio kaj la ĝihadistoj spegulas la patriarkecon, la kapitalismon kaj naci-ŝtaton. Aliflanke, la Roĵava Revolucio proklamas la radikalan demokration, la justecon, la liberan vivon kaj la homajn valorojn”, aldonis la virino. “Temas pri rekta agreso kontraŭ la revoluciuloj kaj la feministoj, kaj oni devas frakasi la silenton de la ŝtatoj”. Por tio, la marŝantaro manifestaciis pasintan jaŭdon^(*) antaŭ la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo (Svisio). Hieraŭ, denove, ili organizis amasan protestadon en Strasburgo (Francio); tie finiĝis, antaŭ la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj, la marŝado komencita en Luksemburgo la 8-an de tiu ĉi monato.

Post fari kritikon de la marksismo-leninismo kaj disvolvi la paradigmon de la Demokrata Konfederaciismo, la kurdoj faris specialajn klopodojn por disvastigi la fundamentojn de tiu ĉi ideologio, kaj la marŝado ne estis escepto. La internaciistoj devis starigi komunumojn, por grupe labori inter la diversaj identecoj – svedoj, katalunoj, italoj ... – fakte, en Kurdio vivas multaj etnoj: ĥaldeoj, asirianoj, araboj ... –. Ĉiutage ili devis fari *Tec Mil*-kunvenon; tio estas prilabori komune kritikon kaj memkritikon, kaj poste transdoni sugestojn al la organizantaro.

Krom tio, ĉiunokte ili aranĝis seminarion: por ke la internaciaj reprezentantoj parolu pri la situacio en ties landoj, por koni la pacproceson en Kolombio, aŭ por klarigi la *Jineology*-filozofion – la in-scienso kreita de la kurdoj –. Aliflanke, laŭ la modelo de la memdefendaj grupoj (tio estas la IPT⁽³⁾), oni ebligis por la inoj spacojn ne miksitajn.

“Ni venis por lerni”

Rimarkeblas inter la internaciistoj la ekscito rilate la Roĵavan⁽⁴⁾ Revolucion. Unue estas anarĥiistoj, komunistoj, feministoj, sendependecistoj, indiĝenoj, ekologiistoj ... el dekoj da landoj. Ĉiuj volas koni la kialojn kaj kielojn de la kurda movado. “Ni venis por lerni”, klarigis la norvego Truls Hoeylanel. La aktivulo en la liberecan-socialisma organizo de Oslo “Motmakt” estas partopreninta kaj, kiel la ceteraj, trovis multajn okazojn por plenumi sian lernemon.

La kurda idiosinkrazio, kiel ne, rimarkeblegis tra la itinero. Ne nur ĉar la virinoj estis en la unua linio, aŭ ĉar ĉie videblis emblemoj pri Ocalan, la IPT kaj la PPT(5); fakte, je ĉiu halto ĉiuagaj kurdoj kuniĝis kaj komencis danci: paŝon antaŭen kaj alian malantaŭen, movo dekstren ... Estiĝis grupetoj ĉie, kiuj ne haltis, ĝis la muziko silentiĝis. Multaj internaciistoj aliĝis al la danco dum aliaj surprizite spektis la spektaklon; por ili malfacilas kompreni, kiel povas esti tiom gaja popolo, kiu senĉese estas la celo de perforto, milito kaj subpremado.

Sed, krom la bonaj flankoj de Kurdio ankaŭ aperis la malagrablaj. Inter la turkoj pliintensiĝis la kurdofobio kaj ultranaciismo pro la homperdoj de la turka armeo dum la atako kontraŭ Afrino. Konsiderante, ke milionoj da turkoj vivas en Eŭropo, la marŝado estis devigata preni severajn sekurecmedojn. La pasintjaraj precedencoj ĉeestis: iun nokton 50 turkoj strebis bruligi la sportejon, kiun uzis la internaciistoj. Iel ajn, aperis 200 kurdoj, kiuj, post bataleto, forpuŝis la agresintojn. "Pasintjare ni devis rompi kapoparon, sed oni ne tuŝis eĉ unu internaciisman kamaradon", esprimis sin trankvile kaj fiere Adnan, juna membro de la sekurecservo.

Kaŭze de tio, oni ne sciigis antaŭe pri la lokoj, tra kiuj devis pasi la marŝantaro, protektdeĵoris kaj, en Svisio, oni uzis kiel dormejojn la publikajn bunkrojn el la tempo de la Malvarma Milito. Same kiel pasintjare, estis sekurectacmentoj por respondi al provokoj kaj atakoj.

Tenereco inter popoloj

Se la solidareco estas dudirekta interŝanĝo, ĝi havas kaj belan vizaĝon kaj malluman flankon. De unu flanko, la internaciistoj ofte restis mirigitaj pro la ĝentileco kaj honesteco de la kurdoj. Meze de horora milito ne mankas al ili rideton nek apudecon, jen de proksime jen de fore. Ĝus komencinta la marŝado, la PPT publikigis mesaĝon por danki la strebon de la internaciistoj; kaj tio, dum la turkaj tankoj kaj helikopteroj estis detruantaj, kaj dekoj da batalantoj mortis.

Kompense, multaj volontuloj aliĝis al Roĵavo. Ekzemplo estis inter la eŭska delegitaro, la filoj de unu membro estas tie: unu jam de jaro kaj duono, kaj la alia foriris ĉisemajne en Afrinon, por labori kiel flegisto meze de bombadoj kaj bataloj.

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo krom la indikitaj):

- (1) Efrîn.
- (2) Konfederacio de la Popoloj de Kurdio (KPK)/Koma Civakên Kurdistan (KCK).
- (3) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (4) Roĵavo. Okcidenta Kurdio/Roĵavayê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Siria ŝtato.
- (5) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Aspuru.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 18-an de Februaro 2018-a.

Tradukis: NXC. Februaro 2018-a. Provlegis: DS.

